

## Trinkaĵo el kakto



La recepto de la tekilo Esperanto Blanco estis kreita kun granda engaĝiĝo kaj sub strikta kontrolo de unu el la plej malnovaj kaj tradiciaj distilejoj Tequila Jalisco, konata kiel „El Liano”. La tekilo estas produktata el zorge elektata blua agavo Tequilana Weber. Esperanto Tequila Blanco estas trifoje distilata. La skatolo estas manfarata de meksika artisto Genaro Pimentel. Unu botelo da ĉi tiu brando kostas ĉ. 80 dolarojn.

**Trinkaĵo el kakto.** La tekilo estas distilata el kaktosuko de blua agavo, ĝi portas la nomon de urbo en Jalisco kaj estas unu el la plej konataj produktoj de tiu ŝtato. La tekilo estas trifoje distilata. Poste ĝi maturiĝas en bareloj el blanka kverko ĝis kiam ĝi atingas elstaran delikatecon kaj aromon.

Oni vendas kvar tekilojn: Esperanto Blanco, Esperanto Reposado, Esperanto Anejo kaj Esperanto Extra Anejo. Bellegan tekil-botelon oni povas aĉeti jam kontraŭ 60-80 dolaroj.

**Blanka aŭ arĝenta.** Ĝi estas enboteligata tuj post la distilado. Ĝi povas esti konservata ankaŭ en ŝtalaj kuvegoj, sed ne pli longe ol 60 tagojn. Sufiĉe bona, se sur la botelo troviĝas la skribaĵo „100 per cent agave”. Kelkaj produktantoj konservas la tekilon blanko en kverkaj bareloj, maksimume 30 tagojn, por mildigi la akran guston.

**Joven abocado.** Laŭaspekte ĝi similas maturan kaj altklasan konjakon. Ĝi estas la tekilo blanko aŭ plata, kio signifas, ke ĝi ne estas kel-kuŝigata. Por ke ĝi havu aromon kaj oran koloron oni aldonas al ĝi karamelon, fruktozon, gliceridon kaj arbajn aromojn. Kompetentuloj nomas ĝin mixto.

**Reposado (maturiĝanta).** Ĝi maturiĝas en kverkaj bareloj dum almenaŭ du monatoj, tamen la tempo de ĉi tiu procezo devas esti ne pli ol naŭ monatojn longa. Ju pli longe ĝi maturiĝas, des pli malhela kaj kverko-gusta estas. En la armo oni flaras altklasan nuancon.

**Anejo (aĝa).** Ĝi maturiĝas dum almenaŭ jaro en bareloj 350-litraj. Danke al tio ĝi ekhavas karakterizan koloron (de flava ĝis bruna), guston kaj aromon. Oni povas trovi dekjaran Anejo, tamen onidire la plej bona estas 4- aŭ 5-jara. Tekilon, kiu havas pli ol tri jarojn, oni nomas anejo aŭ tres anejos.

**Blua agavo.** Antaŭ ol agavo iĝas kolektelebla devas pasi de ok ĝis dek jaroj. Post tiu tempo eklaboras agavokolektantoj – jimadores. Ili tranĉas la planton uzante specialan ilon kun rondigita klingo, nomatan coa. Sekve oni forigas kamecajn, domoplenajn foliojn, kiujn oni uzas kiel nutraĵon por bestoj, aŭ elpremas el ili sukton por fari el ĝi pomadon kontraŭ irito aŭ doloro de muskoloj aŭ artikoj. Tio, kio restas el agavo rezulte de la laboro de jimadores, estas ĝia koro. Ĉi tiu globeca kerno de la planto kreskanta ĉe la grundo, nomata de meksikanoj pina (strobilo), povas pezi de 40 ĝis 50 kg. Kaj el ĝi oni produktas Esperantan tekilon.

## O Boticário signifas apotekiston, arbo estas Esperanto-vorto

Arbo estas kolonja akvo por viroj, kreita kaj ellaborita de la kosmetika firmao O Boticário en 2012 por aventuremaj kaj motivitaj viroj, kiuj trovas la naturon la ĉefa inspiro de la vivo. La tualetakvo havas la odoron de orangfolioj, geranio, mento, mandarino kaj grapfrukto. 100-mililitra ujo kostas 40 dolarojn. Ekzistas ankaŭ Arbo Ocean – aroma parfumo por viroj, enmerkata en 2016. La ĉefaodoro-nuanco de la akvo estas arbo kaj sukceso.

**Arbo, Esperanto-vorto.** Ankaŭ en la portugala la vorto arbo signifas la samon kiel en Esperanto. Interesa estas la historio de la kreigo de la firmao Boticário. La 22-an de marto 1977 apoteko fondita de Miquel Krigsner en la centro de Kuritibo (Brazilo) akceptis la unuajn klientojn. En la apoteko la medikamentoj estis manfarataj laŭ mendoj. Ne temis pri ordinara apoteko. Ĝin konsistigis restoracio, en kiu oni povis trinki kafon, legi gazeton kaj atendi ĝis kiam la medikamento estis pretita. Ĉi tiu formo ekplaĉis al la klientoj, kiuj volonte venadis. La posedanto uzis la ŝancon por enmerkati novajn produktojn: hidratantajn kremojn, ŝamponojn, ŝaŭmlikvaĵojn el algoj. Ĉio ĉi kun la marko de Boticário, plu prezata.

**Komence estis miksilo.** Interese, ke siajn produktojn Krigsner faris en la apoteko uzante miksilon, kiun lia fratino ricevis kiel nuptan donacon. Jam en 1976 la situacio de la firmao estis tiel bona, ke oni kreis vendejon kun kosmetikaĵoj en la flughaveno de Kuritibo. Dum kelkaj jaroj la eta apoteko iĝis ĝermo por la reto de pli ol 3600 vendejoj en Brazilo kaj 600 en aliaj landoj. La marko Boticário iĝis plej ŝatata de portugaloj. La unua luksa parfumejo aperis en la komerca centro Amoreiras. Hodiaŭ Boticário havas 50 parfumejojn en Portugalio kaj pli ol 200 000 fanojn ĉe Facebook.

**Boticário kaj Esperanto.** Ĉu la nomo „Arbo” iel rilatas kun Esperanto? Oni ne scias. Eble temas pri bonŝanca koincido, tamen la fakto estas, ke la nomo de la parfumo kaj la firmao Boticário estas konataj en la tuta mondo – ankaŭ de esperantistoj.

(Foto: amazon.com)



## Esperanta mono

Se kreiĝis internacia lingvo Esperanto, kial ne kreiĝu ankaŭ Esperantaj bankoj kaj mono? Tiel en 1905 pensis esperantistoj. Kaj ĉe la kapo de ili – Ludoviko Zamenhof.

La esperantistoj ne finis ĉe pensado – jam du jarojn poste, en 1907, svisa profesoro René de Saussure proponis establi monunon sub la nomo „speso” (1 spesmilo devis esti egala al 10 spescentoj, 100 spesdekoj kaj 1000 spespoj). Teorie 1 spesmilo havis la valoron de 0,8 g da 22-karata oro, aŭ praktike de 50 usonaj cendoj, 2 germanaj markoj aŭ 1 rusa rublo.

### Esperantaj ĉekoj

En 1908 oni kreis UEA, kaj en la sama tempo en Londono – la Fondajon de Esperanta Ĉeka Banko. La banko emisiis eksperimentajn ĉekojn en la lingvo Esperanto, kiujn hodiaŭ oni trovas la unuaj Esperantaj monbiletoj. Ko-

mence pagi per la ĉekoj povis tiuj, kiuj havis konton en la banko, sed baldaŭ komencis kunlabori kun ĝi aliaj bankoj, interalie el Germanio kaj Francio.

### Arĝentaj spesmiloj

En 1912 okaze de la 25-jariĝo de Esperanto la svisa monfarejo produktis la unuajn arĝentajn monerojn kun la valoro de 1 kaj 2 spesmiloj. Sur ambaŭ moneroj (ili estis malsamaj nur je la grandeco) estis la vortoj: „Jubileo de Esperanto” kaj la datoj „1887-1912”, kaj sur la dorsflanko la vizaĝo de Zamenhof kaj la vortoj „D-ro L. Zamenhof aŭtoro de Esperanto”. Ĝis nun konserviĝis nur du moneroj, el kiuj unu troviĝas en la Esperanto-muzeo en Vieno. Populariĝon de la Esperanto-mono malebligis la unua mondmilito kaj malfondo en la Ĉeka Banko. En la



intermilita periodo en Nederlando oni fondis universalan bankon de spesmilo, kiu emisiis kelkajn monbiletojn. Ili estis uzataj ĝis la dua mondmilito.

### Internacia stelo

Post la milito, en 1946, oni kreis la Universalan Asocion en Nederlando. Oni ankaŭ decidis, ke valoras denove emisii internacian monon, tamen nun kun la nomo stelo. La valoro de stelo estis 0,25 guldeno, aŭ tiom, kiom kostis unu kilogramo da pano. Komence oni

emisiis pagokuponojn kun la valoro de 1 stelo, kaj pli altvalorajn kuponojn oni ne kreis. Nur en 1959 okaze de la 100-jariĝo de Zamenhof la nederlanda monfarejo emisiis monerojn kun la valoro de 1, 5 kaj 10 steloj. La moneroj estis agnoskitaj en ĉiuj landoj kaj uzataj ne nur en pagoj inter esperantistoj, sed ankaŭ en internaciaj pagoj. En 1965 oni eldonis 25-stelan moneron, ankaŭ oran kaj arĝentan por kolektantoj. Kiam en 1979 mortis Andreo Cseh, aktivulo de UEA kaj ŝatanto de Esperantaj monistoj, la asocio malfortiĝis, kaj la ideo de Esperanta mono falis. Multaj landoj (ia. Aŭstrio, Kroatio, Japanio, Kubo, Pollando kaj Svislando) emisiis ankoraŭ Esperantajn monerojn kaj monbiletojn, sed temis pri eldonaĵoj rilataj al datrevenoj de la naskiĝo aŭ morto de Zamenhof, Esperanto aŭ homoj kun meritoj por la Esperanto-movado.

(„GW”, bialystok.wyborcza.pl)